Johann Wolfgang von Goethe,

Elfreĝo

tradukita de Joachim Gießner

Rajdadas tra vent' kaj noktnebul'
la patro kun febranta etul'.
La knabon firmtenas sur sia sel'.
brakŝirmas lin varme sub mantel'.

"Ho fil', vi tremas, ŝvitperlas la frunt'‘?"
"Jen, patro, elforeĝ' en profund',
la elforeĝo kun kron' kaj trenaĵ'."
"Filet', nebul' nur kaj arbaĵ'."

"Vi ĉarma knab', ho, venu nun,
ni kune ludos en bril' de lun'.
Kaj buntaj floroj ĝojigos vin,
orajn vestojn havas mia patrin'."

"Ho patro, ho patro, ĉu aŭdas ne vi?
L'elfreĝo dolĉe promesas al mi."
"Karulo, trankviliĝu, infan',
susuras vento tra seka kan'."

"Vi, ĉarma knab', akompanu min,
la filinoj vartos, dorlotos vin.
La filinoj dancos en nokta rondad',
vin lulos kaj kantos por via dormad"'.

. . .

“Ho patro, ho patro,” ĝemegas la fil’,
“elfinoj jen kun obskura bril’!”
“Filet’, filet’, ekkonas mi ĝin,
salikoj la grizaj trompas nur vin.”

“Mi amas vin, allogas min via belec’,
kaj se vi ne volas, vin venkos fortec’!”
“Ho, patro, li venas, nun sentas mi lin!
Elfreĝo krude perfortas min.”

Rapid-horora la patra rajdad’ -
en brak’ aŭdiĝas singulta ĝemad’.
Kun pen’ li venas ĝis la kort’,
prenita estas la knab’ - de l’mort’.

Traduko de la Germana poemo “Erlkönig” de Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-588-1242 (2012-10-18 16:09:46)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en `http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html` *. sub* `http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf` *.*